LA PERD'IT'A ŜLOS'IL'O

La kunmetitaj vortoj rezultas de simpla kunigo de la elementoj, kiuj formas ilin, skribitaj kune sed disigitaj per streketoj[*]. La fundamenta vorto devige sidas fine. La gramatikaj finaĵoj estas rigardataj kiel vortoj. Ekzemple : vapor'ŝip'o konsistas el vortoj: vapor, ŝip, *o* – karakteriza finaĵo por substantivo.

[*] En leteroj aŭ verkoj por personoj, kiuj jam konas la lingvon, oni povas malmeti tiujn **streketojn**. Ili celas ebligi al ĉiuj facile trovi en la vortaro la precizan sencon de ĉiu el la elementoj de la vorto, kaj sekve ricevi la kompletan signifon sen ia ajn antaŭa studo pri gramatiko.

Ĉu ni'a nun'a prezent'o de la lingv'o ne perfid'as tiu'n Fundament'a'n regul'o'n ?

Tamen en tiuj malzorgitaj frazoj sidas retrovinda ŝlosilo. Zamenhof klarigis ĝin en la Unua Libro:

"Mi aranĝis plenan **dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn**, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el **senŝanĝaj vortoj**."
"... mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke... la dismembriĝo de la lingvo neniom embarasas la lernanton; li eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas **finiĝo aŭ prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto**, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel **vorto radika aŭ** kiel **gramatika parteto**."
[Krestomatio 1903 el La Unua Libro]

Derivado en Esperanto, d(e)rivado de Esperanto !
Hodiaŭ preskaŭ ĉiu, kiu volas klarigi la Esperantan vortfaradon, anstataŭ prezenti **la Fundamentan kunmetadon** parolas pri **derivado**. Tamen nek en la Unua Libro, nek en la Dua, eĉ nek en la Fundamenta Krestomatio, oni trovas tiun vorton. Ĝi abundis nur ekde la konfliktoj, kiuj kondukis al la Idoskismo.



** Tro simpla ?

" mi scias la inklinon de la plimulto da homoj rigardi aferon kun des pli da estimego, ju pli ĝi estas komplikita, ampleksa kaj malfacile-digestebla. "

" Tiaj personoj, ekvidinte la malgrandegan lernolibron kun plej simplaj kaj por ĉiu plej kompreneblaj reguloj, povas preni la aferon kun ia malestima malŝato..."

Ĉu gravas rigardi finaĵon kiel vorton ?

Ni observu la 100 unuajn vortojn de la antaŭparolo de la Fundamento:

El 100 (plenaj) vortoj,
36 estas memstaraj (solstarpovaj), kiel : por, ke, kaj, ĝi ...
64 estas kunmetitaj, kiel : antaŭparolo, lingvo, internacia, povu, bone ...
22 havas finaĵon el la sama semantika kategorio : lingvo, progresadi, necesa ...
42 havas proprafunkcian finaĵon, kiel : antaŭparol'o, internaci'a, pov'u ...

en **66% el la kunmetitaj vortoj la finaĵo estas la Fundamenta vorto**,
ĝi donas sian propran sencon al la kunmetaĵo.

j = pli ol unu [*pluralo*]
n = je, al, celata (de la ago aŭ movo), [*akuzativo*]

o = tio, kio estas, *o* respondas al nedifinita artikolo en kelkaj lingvoj, [*substantivo*]
a = kiu estas ...(havas la kvaliton...), rilata al, [*adjektivo*]
e = laŭ maniero, rilate al [*adverbo*]
i = manifestiĝi [*infinitivo de verbo*]
u = i laŭ volo-ordono-dezirmodo [*volitivo*]
as = i en nuno aŭ ĉiam [*prezenco*]
is = i antaŭ nun [*preterito*]
os = i post nun [*futuro*]
us = i laŭ kondiĉomodo [*fiktivo*]

aĉ = malvalora
ad = ripete aŭ daŭre aŭ kutime agi
an = ulo membro de
ant = kiu plenumas manifestiĝon, nun partoprenas [*aktiva prezenca participo*]
ar = grupo, kolekto
at = kiun oni plenumas nun [*pasiva prezenca participo*]
bo = peredziĝparenca
dis = malkune
ebl = kiu povas okazi
eg = je grado pli granda
ej = loko (por)
ek = subite komenci
eks = jam ne plu estanta
em = kiu amas, havanta motivon por
end = deviga
er = plej eta elemento
et = je grado pli malgranda

Jen vortoj, aŭ **vortunuoj**, kiuj povas naski :
Ni nomu ilin **naskaj vortoj.**

kategoriajn vortojn (finaĵoj: **n, j, o, a, e, i, as**...),
semantikajn familiojn da vortoj (**ul, aĵ, ej, ec**...)
aŭ novajn rilatajn vortojn (**mal, ek, al, et**...).



ge = ambaŭseksa
id = naskito, posteulo
ig = fari ke iu agas, statas, ke io manifestiĝas
iĝ = statŝanĝi, ekesti tia
il = instrumento
in = idnaskpova
ind = meritanta, valora por
ing = nurparta entenanto
int = rilata al antaŭa partopreno, kiu jam plenumis manifestiĝon [*aktiva preterita participo*]
ism = sistemo, doktrino
ist = profesiulo, adepto
it = kiun oni plenumis [*pasiva preterita participo*]
mal = simetrie kontraŭe, laŭ kontraŭa kvalito
mis = malbone, maltrafe
ne = malakcepte
obl = proporcie multiga
on = frakciiga
ont = preta por, kiu plenumos manifestiĝon, rilata al posta partopreno [*aktiva futura partic.*]
op = kuniga
ot = kiun oni plenumos, preta por esti [*pasiva preterita participo*]
pra = primitiva, malproksime parenca
re = ripete, revenante
uj = entenanto, enhavilo
ul = individuo, estaĵo
um = Io kun ia rilato al la signifo de la radiko aŭ manifestiĝi iurilate al ties signifo.

FONTOLISTO :
– *La Unua Libro* (Z.)
– *Fundamento de Esperanto* (Z.)
– *Resumo de la teorio de Antido* (R. De Saussure)
– *Fundamenta Krestomatio*
– *Ĉu Esperanto estas Fundamente facila?* (Pjer T. Buvje)
– *Lingvaj Babilaĵoj* (A. Cherpillod)
– *La Bona Lingvo (C. Piron)*
– Plena Gramatiko de Esperanto (Kalocsay-Waringhien)
– *http://edukado.net/* instrumaterialoj?iid=23606&s=706e8721e3d5cbdb4b1f2b4c233222ac

UZO :

Ju pli la vortunuo centras, des pli ĝia senco vastas. Kontraŭe la senco de iu ajn ĉirkaŭa vorto estas entenata en tiu de pli interna vorto sur la sama vojo al centro. Ekzemple **estr** estas jam ia **ist**, tiu ĉi lasta estas jam **ul**, kiu mem estas ovorto. Do ne necesas skribi: estr'ist'ul'o, estr'o sufiĉas. Tiu kunmeto povas ricevi sencon ankoraŭ pli precizan (malvastan) : sufiĉas precizigi kion tiu estras. Do povas esti: ŝip'estr'o aŭ temi pri alia ej'estr'o, ekzemple: lern'ej'estr'o... . Uzante tiujn vortunuojn (semantike difinitaj), oni uzas la izolan strukturon de nia lingvo, sekve la vortfarado iĝas simplega : sufiĉas scii, ke la fundamenta vort(unu)o devige sidas fine aŭ alidirite

**** ĉiam la determinanta vort(unu)o antaŭas la determinatan.**

Danke al la difinoj donitaj ĉiuflanke de la skemo, eblas anstataŭigi la francan signifon de ĉiuj vortunuoj al tiu de sia propra lingvo.

Vivu la Fundamenta ŝlosilo !